

Fulgara **ESPERANTISTO**



E N H A V O

* * 1975 — Internacia Jaro de la Virino	1
Ekarelina Majburova — Lulkanto	3
A. S. Puŝkin — Se vin trompos via vivo	3
* * Literatura konkurso	3
Mihaly Gergely — Soleca telefonulo	4
Hajredin Dural — Mia kredo. Sraduko el la turka de Ahmed Asker	8
B. Kavalĝiev — Granda packunveno en Ruse	8
Iv. Gradinarski — Esperanto-kurso en Vraca	8
L. Leviĉarov — Jarkunveno de esperantistoj-filatelistoj	9
Vasil Petrov — Vigliĝo en Batak	9
D. Minĉev, Cv. Todorov — Riĉa kaj varia E-agado en Ŝumen	9
Adolf Schwarz — Letero al E-Societo „Vekiĝo“ en Ŝumen	10
A. Smolin — En Kronach	11
D-ro L. L. Zamenhof — Letero al „Danubo“	11
N. Z. Maimon — Bjalistoko	12
Violin Oljanov — Iuj metodikaj demandoj de la E-instruado	14
L. Jevsejeva, I. Belivanova — Erinaco (kanto)	16
Rosica Vâlcanova — Humuraĵoj	16
* * Tra la gazetaro	III

Sur la kovrilpaĝo:

*Malnova kutimo de la bulgara popolo:
en la tago de la Nova Jaro la infanoj surstrate aŭ en la do-
moj gratulfrapetas per kornusbranĉetoj la dorsojn de familia-
noj, parencoj, konatoj k. a. , eldirante bondezirojn.*

*Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; [korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

**1975 — INTERNACIA JARO DE LA VIRINO**

Al la virino, kiu naskas la vivon, kiu vartas kaj edukas la infanojn, kiu gardas la familian neston, al la virino, kiu laboras kaj produktas en uzinoj kaj fabrikoj, en oficejoj kaj surkampe, al la virino, kiu partoprenas aktive la soci-politikan vivon kaj batalas por siaj homaj kaj sociaj rajtoj, por stabiligo de la paco kaj internacia kunlaborado sur la tero — estas dediĉita la jaro 1975. En la rezolucio de 18 de decembro 1972, per kiu la Ĝenerala Asembleo de UNO prenis la decidon pri tio, oni diras, ke la devizo de la virinaro estas „Egaleco, disvolviĝo, paco!“.

En Bulgario estas fondita Nacia Komitato, kiu ellaboris vastan programon por agado dum la Internacia Jaro de la Virino.

Dum tiu jaro la bulgara virino manifestos solene kaj flere, sian plenvvaloran partoprenon en la konstruado de nova, feliĉa vivo en sia libera Respubliko, sian absolutan egalrajtecon kun la viro en ĉiuj sferoj de la homaj aktivecoj.

La virino en la kapitalismaj landoj manifestos sian volon batali kontraŭ la ekspluatado de sia laboro, kontraŭ la senrajteco kaj senlaboreco, kontraŭ la militminaco — por ekonomiaj, politikaj kaj sociaj rajtoj, por estimo al ŝia digno kiel membro de la socio, kiel homo.

Triobla estas la subpremo de la kolorhaŭta virino en la kapitalismaj landoj, ŝi suferas kiel ano de la laborista klaso, kiel kolorhaŭtuŭino kaj kiel virino. En tiuj landoj la senlaboreco inter la blankaj virinoj estas 6,3% kaj inter la kolorhaŭtaj virinoj — 10,8%.

En Bulgario, same kiel en Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj, la virino ne konas senlaborecon. Male, ŝia partopreno en la ĉiufanka vivo de la socio konstante kreskas. Ekzemple, en 1956 j. en la socia sfero ĉe ni laboris ĉirkaŭ 382 000 virinoj, hodiaŭ ilia nombro atingis 1265 000. Jam pli ol 30 jarojn la bulgarino marŝas laŭ la vojo de la socialismo kaj okupas indan lokon en la sociolitika, ekonomia kaj kultura vivo de la lando. Multaj bulgaraj virinoj laboras ĉe plej altaj postenoj. Ekzemple Cola Dragojĉeva estas membro de la Politika Buroo de CK de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Tutpopola Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco. Svetla Daskalova estas ministro de la justico kaj membro de la centra gvidantaro de la partio Bulgara Agrarista Popola Unuiĝo. Elena Lagadinova estas membro de la Ŝtata Soveto kaj prezidantino de la Komitato de la Bulgaraj Virinoj. Maria Zaharieva estas vicministro de la eksteraj aferoj, Ljudmila Jevkova — unua vicprezidanto de la Komitato de Arto kaj Kulturo, Sibila Radeva — vicministro de la popola sanprotekto, inĝ. Juliana Kazakova — vicministro de la interna komerco kaj la priservoj, inĝ. Ekate-

rina Marinova — vicministro de la agrikulturo kaj la nutraĵproduktado, Roza Koritarova kaj Dora Belčeva — ambasadoroj en eksterlando ktp.

Inter la nomoj de la plej famaj reprezentantoj de la bulgara arto, kulturo kaj scienco viciĝas ankaŭ la nomoj de multaj virinoj: la poetinoj Elisaveta Bagrjana, Dora Gabe, Stanka Penčeva, Blaga Dimitrova, Liana Daskalova k. a., la aktorinoj Olga Kirčeva, Ruŝa Delčeva, Irina Taseva, Margarita Duparinova, Nevena Kokanova k. a., la operartistinoj Naŝja Aŝean, Julia Viner, Rajna Kabaŝvanska, la estradaj kantistinoj Lili Ivanova, Margaret Nikolova k. a., la virinoj-sciencistoj Maria Moldovanova — profesoro de elektraĵ duonkondukiloj, Nikolina Mančeva — profesoro de kuracfizika kulturo k. a.

Multaj jaroj pasis de kiam la unuaj tekstistinoj Maruŝja Todorova, Olga Najdenova k. a., laborintaj samtempe per multaj maŝinoj, fariĝis inĝenieroj, portantaj plej altajn distingojn de la ŝtato. Jam centoj kaj miloj da virinoj estas honoritaj de la popola registaro per altaj titoloj, per oraj kaj arĝentaj ordenoj. Najda Mančeva estas dufoje heroo de la socialisma laboro, herooj estas ankaŭ Tanka Petrova, Emine Hĵuseŝnova k. a. Grindega estas la nombro de la virinoj, laborantaj en la vilaĝmastrumo, kiuj merite portas laborordenojn.

Sur la internaciaj arenoj la bulgaran sporton famigis virinoj kiel Maria Gigova — absoluta mondĉampiono de arta gimnastiko, Stefka Jordanova — mondĉampiono de kurado je 800 metroj, Jordanka Blagoeva — mondĉampiono de saltado k. a.

Patrine zorgas la popola ŝtato kaj ĝia gvidanta forto — la Bulgara Komunista Partio — por plibonigi la socian staton de la virinoj, por harmonie kunligi ties funkciojn de laboristinoj, dommastrinoj, edzinoj kaj patrinoj kaj plene disvolvi iliajn kreaĵn kapablojn. Aparte atentaj estas la zorgoj al la virino-patrino: ŝi ricevas pagitan forpermeson de 6 monatoj — por la unua infano, de 7 monatoj — por la dua, de 8 monatoj — por la tria, kaj de 6 monatoj por ĉiu sekvanta infano. Krome la patrino, se necese, rajtas ricevi ankoraŭ 2-monatan jam nepagitan forpermeson, kiu tempo estas rekonata kiel ofica rilate la pension. Se infano ĝis la 15-jara aĝo malsaniĝas, oni donas 60-tagan pagitan forpermeson al la patrino. Grava helpo por la patrinoj estas ankaŭ la ekzistantaj multaj infanvartejoj kaj infangardejoj, kies nombro konstante kreskas. La gelernantoj de la unua ĝis la kvara klaso ricevas senpage lernolibrojn kaj kafejojn. La prezoj de la beba kaj infana vestaĵo estas speciale reduktitaj.

Per ĉiuj ĉi kaj multaj aliaj zorgoj Popola Respubliko Bulgario montras, kiel ĉe la socialismo oni solvas la gravajn kaj komplikajn problemojn de patrinoj, infanoj, maljunuloj, malsanuloj ka.

Ĉe la kapitalismo kaj rasismo la bulgaraj virinoj batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la viroj por nova vivo en nia lando. Multaj pereis en la batalo. Inter ties nomoj brilas ankaŭ la nomoj de sindonaj esperantistinoj: Vela Piskova, Penka Mihajlova, Vela Peeva k. a. Nun la bulgaraj virinoj entuziasme konstruas la socialismon en sia patrolando. Sed ne forgesante la viktimojn, la pasintajn humiligojn kaj suferojn en la antagonisma klasa socio, ili fratine etendas brakojn al la virinoj ĉie en la mondo, kiuj batalas por libera kaj digna partopreno en la ĉiufanka vivo de la homa socio, kontraŭ la ekonomia kaj socia ekspluatado; kontraŭ la nacia kaj rasa humiligo

(Sekvas sur p. 8)



LULKANTO*

de Ekaterina Majburova

Luli, luli, nepineto,
luli, luli, karulin'!
Sonas, sonas la kanteto,
baldaŭ ĝi dormigos vin.

Nokt' senbrua jam alvenas,
supreniras bela lun',
tutan mondon ĉirkaŭprenas
dolĉa sonĝo. Dormu nun!

Floroj dormas en ĝardeno,
ankaŭ nuboj en ĉiel',
ne dormetos ĝis mateno
nur la bela hela stel'.

Fermu, fermu okuletojn,
mia kant' dormigos vin.
Luli, luli, nepineto,
luli, mia karulin'!

POEZIO kaj BELETRO

SE VIN TROMPOS VIA VIVO . . .

de A. S. Puŝkin

Se vin trompos via vivo —
ne koleru, for la ĝem'!
Dum ĉagreno kredu mem,
ke la ĝojo estos via!

Koro vivas en estont',
nun enua kaj malvarma, —
ĉio pasas en la mond',
ĉio pasis — ŝajnas ĉarma.

El la rusa: Ek. Majburova

* La versaĵoj „Lulkanto“ kaj „Se vin trompos via vivo. . .“ ricevis II-ajn premiojn po originala kaj tradukita poezio en la jubilea Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto“ — 1974.

LITERATURA KONKURSO

Lige kun la 30-a datreveno de la glora venko super la faŝismo kaj hitlerismo „Bulgara Esperantisto“ anoncas literaturan konkurson en la branĉoj **originalaj prozo kaj poezio kaj tradukita poezio**. La partoprenontoj devas trakti la kontraŭfaŝisman batalon, la kontraŭfaŝisman militon, la konstruadon de nova vivo post la venko, la nuntempan batalon kontraŭ la reakciaj fortoj kaj la militinstigantoj, la batalon por paco kaj nova, feliĉa vivo por la popoloj.

La konkurson povas partopreni ĉiu bulgara aŭ eksterlanda esperantisto. Unu persono rajtas prezenti ne pli ol 3 originalajn kaj 3 tradukitajn poeziaĵojn kaj ne pli ol 2 prozaĵojn. Ĉiu partoprenanto uzu nur unu pseŭdonimon.

Limtempo por prezenti la verkojn: la 30 de aprilo 1975.

Speciala jurio prijuĝos la konkursaĵojn. La plej bonaj estos premiitaj. Kelkaj aperos en „Bulgara Esperantisto“.

La konkurso estas sekreta. La maŝine aŭ mane (sed klare!) skribitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermitan koverton, en kiun oni anticipe metu slipeton kun la vera nomo de la konkursanto kaj ties konstanta adreso. Ĉion oni enmetu en pli grandan koverton kaj sendu ĝin al adreso: „BULGARA ESPERANTISTO“, bulv. ĤRISTO BOTEV 97 SOFIO (por la konkurso).

La jurio ne prijuĝos verkojn, kiuj ne respondas al la supraj kondiĉoj! Geamikoj el ĉiuj landoj, partoprenu amase nian Literaturan Konkurson!



SOLECA TELEFONULO

de MIHÁLY GERGELY

Mihály Gergely (Mihaj Gergej)* naskiĝis en 1921 en nord-hungara minvilago. Li estis ferindustria faklaboristo, soldato, fabrika oficisto, teknika ĉefo, redaktoro de ĵurnalo, literatura kontrolisto en la Hungara Radio, sekretario en la Asocio de Hungaraj Verkistoj. Depost 1957 Gergely vivtenas sin el verkista kaj ĵurna-

lista laboro. Li estas kunlaboranto de la Buda-peŝta „Hungara Nacio“ (tagĵurnalo de la Patriota Popolfronto). Ĝis nun aperis de li dek kvar volumoj da noveloj, raportajoj kaj sociografiaj verkoj. Pro lia verkaro oni lin honoris per la literatura premio Attila József.



De tagoj eĉ unu uzebla penso ne venis al li en la kapon, eĉ unu frazon li ne sciis verki, kvankam lin ege premis la limdato de eseo-volumo. Li legadis, atendante Marta-n, de kiu li esperis horojn trankviligajn kaj ankaŭ refortigajn. Esperis, jes, sed pli kaj pli malcerte; de monatoj li vidis pli kaj pli klare, ke ilia multjara amrilato jam finiĝadas. Nepre sentis kaj volis tion Marta, fragila virino de tiel aparta beleco, kiu ĝis nun apartenis nur al li. Li vivis sola. Post la unuaj rendevuoj li petis Marta-n fariĝi lia edzino. Mult-

foje li ripetis la peton, sed Marta ĉiam neis, neniam dirante kial.

Marta estis ĉiam akurata, kaj nun jam pasis la kutima kvina horo. Eĉ en la torporo, ĉiam pli reganta lian korpon kaj cerbon, liaj nervoj jam kvazaŭ ektintis pro la streĉo.

En la ĉambro estis agrabla varmo, ĉar li amis la varmon. Ne tiom korpe li suferis pro la malvarmo, kiom interne li frostetis, kaj tio ĉiam paralizis lin en la laboro. Li iris al la fenestro, atentis la kontarŭflankan aŭtobushaltejon. Unu post alia pasis kvar aŭtobusoj, sed Marta ne venis. La horloĝo batis tri kvaronojn post la kvina. Almenaŭ ŝi telefonu!

Kaj nun eksonis la telefono. Kun ekscita rapideco li levis la aŭdilon.

— Halo!

— Ĉu la Johan-hospitalo? — aŭdiĝis virvoĉo.

— Ne! Privata loĝejo.

— Pardonu, ĉu 154 030?

— Ne! Misa interkroĉo.

— Pardonon, sinjoro!

— Nenio okzis.

Li demetis la aŭdilon, sed apenaŭ li faris du paŝojn direkte al la fenestro, la telefono lin postkriis.

— Jes!

— Ĉu Aleĉjo? . . . Ha, terure malfacile mi ricevis kontakton kaj. . .

— Pardonu, sinjorino, sed se vi deziras daŭrigi, vi devas scii, ke mi ne estas via Aleĉjo.

* M. Gergely estas ĉefredaktoro de „Hungara Vivo“ — revuo de Hungara Esperanto-Asocio. En septembro 1974 li estis en nia lando kiel gasto de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj. Membroj de nia Redakcio renkontiĝis kun li. Ni prezentas lin al niaj legantoj per lia originale verkita en Esperanto rakonto „Soleca telefonulo“ kun etaj lingigoj. Rim. de la Red.

— Ĉu vere ne? Kun kiu do mi parolas?

— Ne kun Aleĉjo.

— Pardonu.

— Mi petas.

Li turnis sin ree al la fenestro, sed la telefono denove tintegis.

— Jes!

— Ĉu la Akademio Zrinyi? — La voĉo apartenis al junulino.

— Ne.

— Do?

— Mi ne estas la Akademio Zrinyi.

— Tial oni ne devas malgentili.

— Kial do mi malgentilis, filinjo?

La nekonatino senvorte forpasis el la linio.

Li rezignaciis, ekfumis, sidigis en la fotelon ne malproksime de la kahelforno, apud la freneziginta telefono. Prenis en manon literaturan revuon, sed la telefono tuj anonciĝis.

— Halo, Aleĉjo, ĉu estas vi ĉe la telefono?

— Bedaŭrinde, sinjorino, sed. . .

— Ho, denove vi!

— Kion fari? Jam la duan fojon okazas, ke freneziga mia telefono. Mia ĉirkaŭaĵo ŝajne estas malbona telefontereno. En tri minutoj vi estas la kvara, kiu estas alproksima erare.

— Kial vi ne anoncas tion al la centralo?

— Mi faris jam foje. Oni rekomendis atendi kelkajn horojn.

— Kion nun mi faru? Pro via freneza aparato elĉerpigis miaj telefonmoneroj.

— La centralo eraradas, ne mia aparato.

— Ankaŭ tiukaze! Ho, vi! . . .

Li sciis, ke la difektiginta centralo lin ne lasos trankvila, sed hodiaŭ li devis resti ĉe la telefono. Anonci li intencis la difekton al la centralo, sed ia stranga inertece lin detenis. Dume, la telefono ne silentis eĉ minuton.

— Halo!

— Ĉu la loĝejo Lekencei?

— Tute ne.

— Do kiu?

— Ĉu ne estas tute egale por vi, sinjoro?

— Sed jes, kaj ankaŭ tio, se vin tuj trafos apopleksio! Idiotoj!

— Vere, vi estas de delikata sentimento. Dankegon!

— Krevu!

Li senresponde demetis la aŭdilon kaj atendis novan viktimon.

— Halo, ĉu Florprodukta Kooperativo Rozmarenro?

— Ne! Kafejo Mortofloro.

— Ĉu? Ĉu do ne Koopo Rozmarenro?

— Ne! Papilio-kaptejo Papavo.

— Kial vi arlekenas? Ĉu vi volas amuziĝi? Sagega kapo!

— Halo! Ĉu nervosanatorio?

— Ankoraŭ ne!

— Kion signifas, ke ankoraŭ ne? . . . Mi volus paroli kun doktoro Varga, se li troviĝas tie.

— Mi diris, ne nervosanatorio.

— Kio do?

— Privata loĝejo.

— Kial vi ne komencis per tio? . . . Kelkaj havas multe da tempo!

— Laĉjo? Salut', karulo! Do mi povas al vi supreniri?

— Ĉu vi insistas pri Laĉjo?

— Halo! Kial do—ĉu mi insistas? Kiu estas tie?

— Iu, same atendantanta iun; iun, kies voĉo estas ĝuste tiel agrabla kiel la via, sed. . .

— Kun kiu mi parolas?

— Mi bedaŭras, sed ne kun Laĉjo.

— Kial vi ne komencis per tio, ke vi prezentu vin?

— Ĉis nun mi kredis, ke tiu prezentas sin, kiu ien enpaŝas.

— Pereu, vi . . . abomena etiketinstruisto.

— Aleĉjo, ĉu estas vi?

— Ŝajne, vi povis do aĉeti telefonmonerojn.

— Halo, kiu estas tie?
 — Ne Aleĉjo.
 — Ho, denove vi!
 — Pardonu, sinjorino.
 — Diru vi, nevidebla monstro, ĉu vi amuzas vin per tio, ke vi sidas apud via aparato kaj ĝojas pri la misa alkroĉiĝo de sensuspektaj telefonulcĵoj?

— Mi vere bedaŭras, ke vi malŝparis pro mi tri telefon-monerojn; ĉi-vespere mi ne povas eliri el la hejmo.

— Kaj kial ne? . . . Ĉu vin ne nervozigas la nekonataj telefonantoj?

— Ne ĉiu. . . Ekzemple vi tute ne. Mi plezuras pri tia velura, plensonora alda voĉo. Ĝi memorigas pri Elizabeta Komlósi.

— Flata komplimento, sed min ne konsolas.

— Mi scias.

— Diru, ĉu mi aŭdos ĉiam vin, se mi volas ĉi-vespere paroli kun Aleĉjo?

— Provu el alia telefonejo, eble vi havos sukceson.

Pasis la sesa, li certigis, ke li vane atendas. Iu malhelpas Marta-n, aŭ ŝi . . . simple ne volas veni. Ankaŭ nun tiu fortanima, decidema Marta faros la unuan paŝon, kiel ĉe ilia konatiĝo, pro kio li duoble estimis ŝin dekomence.

Li vokis la oficejon de Marta, sed de tie ŝi eliris je la kvara kaj duono, diris purigistino.

Al ŝia hejmo li ne povis telefoni: promeso ligis lin neniam tion fari, kio ajn okazus.

— Halo, Paŭĉjo? . . . Ve, mi estas tre afliktita ĉi-vespere. Ĉu vi scias, kio al mi okazis?

— Ne.

— Imagu, oni min vokis por kontrolo, kaj ŝajnas, ke oni trovis ion. Kiam mi hejmeniris, jam atendis tie la invitulo de la onkologio, oni vokas min por nova ekzameno. . . Dio mia, mi terurigiĝis!

— Ne terurigu. Ĝustatempe malkovrita kancero estas kuracebla diversmaniere— per radiado, per operacio...

En la mondo pli ol cent institutoj studas kaj serĉas la kuracmetodojn de la kancero. La hungara profesoro Szent-Györgyi, vivanta en Usono, eksperimentis. . .

— Halo! Paŭĉjo, de kiam vi interesiĝas tiom pri la kancer-esploradoj?

— Pri multo oni interesiĝas, pri kio oni ne parolas.

— Halo, Paŭĉjo! Ĉu estas vi? Ho, diaŭ via voĉo estas tiel stranga! . . . Halo! Kun kiu mi parolas? Kial vi ne respondas?

— Mi ne estas Paŭĉjo, sed kion mi diris pri la kancero, tio estas vera. Vi ne devas terurigi. Eble necesas pli zorga ekzamenado. . .

— Ĉu vi diras, ke mi ne havas kanceron?

— Kaj eĉ se vi havus! Vi devas ja esti en komenca stadio, se ĝis nun vi rimarkis nenion. Kaj tial certe oni elkuracos vin.

— Ĉu vi estas doktoro?

— Ne, sed ĉiuj gazetartikoloj scias tiom pri la kancero.

— Mi petas pardonon pro la ĝeno... Kaj dankon por la trankviligaj vortoj Bonan vesperon!

— Bonan vesperon, sinjorino!

— Halo, oĉjo Eŭgeno?

— Ne.

— Pardonu.

— Ne grave.

— Paŭĉjo?

— Ne, sinjorino.

— Ho, ne koleru.

— Mi ne koleras. Ĉi-vespere mi havas tempon.

— Sed se ni jam renkontigis nun denove, ĉu vi ne parolus al mi pri la nuntempaj kancer-esploroj?

— Mi estus blufulo, se mi tion farus. Certe vi havas doktor-konaton, mi proponas, serĉu lin anstataŭ Paŭĉjon, li informos vin pli bone ol ni duope.



— Jus vi menciis la nomon de Szent-Györgyi. Ĉu estas li, kiu ricevis Nobel-premion pro siaj paprik-esploroj kaj elmigris al Usono?

— Ĉu vi scias ĉion ĉi el libroj?

— Ho, mi jam ne estas kokidetó... Ĉu li vere esploras nun la kanceron?

— Kaj eĉ per tre interesa metodo kaj kun esperigaj rezultoj. Antaŭ ne-longe la gazetoj publikigis lian deklaron. Ĉu vi ĝin ne legis?

— Ŝajne mi pretervidis. Kion do li deklaris?

— Li nomis skandala stulto, ke mal-graŭ la bonaj rezultoj de la esplorado, la usona registaro fortiris de lia instituto la provizan sumon bezonan por definitiva sukceso, kvankam ĝi estus malpli ol unutaga kosto de la Vjetnama milito.

— Terure! Dio mia, kiaj estas la homoj! Ve, mi devas fini, jam tri personoj atendas por telefoni. Kion do vi konsilas?

— Prenu trankviligilon, provu bone dormi kaj morgaŭ iru al la kontrol-ekzameno. Ne timu!

— Dankon. Mi ĝojas, ke kun tia bonfarulo mi parolis.

— Halo! Oĉjo Eŭgeno?

— Oĉjo Eŭgeno hodiaŭ elmigris.

— Kion li faris? Kio okazis al oĉjo Eŭgeno?

— Mi diris: la oldulo iris transli-men en angla maniero.

— Sepdekjarulo? ... Kun kiu mi parolas? Ĉu onjo Maria estas hejme?

— Ankaŭ onjon Maria kunportis la maljuna sinjoro.

— Aĉe, misguste vi, telefon-bandito! Kial vi ne diras tuj, ke la interkroĉo estas falsa? Tiajn oni devus eltiri el la trafiko, ke ili ne rongu la nervojn de la homo.

— Slut', Princo!

— Slut', Katinjo.

— Kio do, ĉu vi dume viriĝis? Via

voĉo estas tiel mallaŭta.

— Mi raŭkigis.

— Nu, ĉu vi venos en la espreson?

— Jes, certe.

— Mi atendos vin! Slut'!

— Slut'!

— Aleĉjo, ĉu estas vi?

— Jes.

— Ho, se vi sciis, de kiam mi vin vokadas! Jam trifoje al ia malfeliĉulo min ligis la centralo. Ĉu vi scias, kio nova?

— Mi aŭskultas.

— Ĉu nur „mi aŭskultas“? Vi parolas nun tiel flegme, kiam ni jam interparolis, ke hodiaŭ mi metos klara la aferon kun mia edzo kaj poste tuj mi vokos vin.

— Mi scias, scias, daŭrigu. Kio estas?

— Imagu, Georgo konsentis la eks-edziĝon. Dio mia, fine mi estas libera kaj de nun sole kaj vere, tute kaj ĝismorte la via! Espereble ankaŭ Kate-rina konsentis eksedzinigi. Vi vidos, kiel belegajn infanojn ni havos! Fine ni havos infanon! Ĉu vi komprenas?... Halo! Kial vi ne respondas?... Halo! Aleĉjo, kial vi mutas? Diru jam ion, dio mia! Aŭ ne estas vi? Halo! Ĉu vi estas tiu? Denove vi?...

Li ekhontas, rompas la interkroĉon, demetas la aŭdilon sur la tablon, ek-fumas, iradas tien-reen: li estis tro bombardata de hazardaj dialogoj. Poste li iras al la fenestro. Malvarma novembro vespero. Nebulo. Eĉ unu aŭto-buso el la alvenantaj ne alportis Mar-ta-n. Li paŝadas al la forno, sin apogas dorse al ĝiaj varmegaj kaheloj, tamen frostotremetas. De nun — li pensas — se Marta ne venos plu, li havos mult-foje tiajn solecajn vesperojn, ĉar viro en tia aĝo, ĉe la sojlo de la kvinde-kaj jaroj, havante iom da memkritiko, devas rekoni, ke li malfacile jam tro-vos tian virinon kiel Marta.

MIA KREDO de Hajredin Dural

La kredo kaj laboro al mi fortegon donas,
ne estus homo mi, se mi ne havus ĝin.
La volo kaj batalo min al la venko spronas,
sen volo kaj batalo mi restus nur ruin'.

La lum' de l' bonfarado sur via frunto brilu,
kaj ne permesu, ke vin makulu monpasio.
Agadu ĉiam laŭ postuloj de la justo,
evitu vin riĉigi je konto de l' socio. . .

Eĉ se al vi la vivo proponus ortrezoron,
por la justeco batu senĉese via koro.
Rilatu vi honeste al ĉiuj homofratoj.
Kaj timu la fiagojn de l' nigra malhonoro.

Ne logu vin fiero, diboĉo kaj malĉasto,
la alta celo estu plenumo de la devo!
Kaj vian konskiencon demandu: kiel agi
por esti puranima ĉe dono kaj ricevo.

El la turka: *Ahmed Asker*

Ne kalumniu vian kolegon aŭ najbaron,
ne laŭdu hipokrite la ĉefojn potencegajn.
Prefere serĉu viajn erarojn, viajn mankojn,
atente, bonintence kritiku la kolegojn.

Lumigu vian vojon per via propra lumo,
per via torĉo montru la vojon de l' bonfaro.
Survoje al progreso kuraĝe iru ĉiam,
ĉar estas ĝi la celo plej alta de l' homaro.

Penadu esti ĉiam en la unuaj vicoj,
en la labor' komuna ne stumblu kaj ne falu,
konduku kun prudento kaj kun animtrankvilo,
neniam malesperu en via pacbatalo.

ORGANIZAMO

GRANDA PACKUNVENO EN RUSE

En Ruse je la 18 de oktobro ĉ. j. la socioeto por disvastigo de popularsciencaj konoj „Georgi Kirkov“, la Patrolanda Fronto kaj la Distrikta E-Komitato organizis packunvenon. En ĝi k-do Nikola Aleksiev, prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj de Bulgara E-Asocio, parolis pri la problemoj de la paco en hodiaŭa aspekto kaj pri la MEM-problemoj.

La aŭskultantoj estis rapide kaptitaj de la interesa temo kaj la oratora majstreco de nia prezidanto. Lia prelego plaĉis al ĉiuj esperantistoj kaj neesperantistoj.

Post la prelego k-do Aleksiev speciale por la esperantistoj rakontis pri la 59-a Esperanto-kongreso en Hamburgo.

Unu el la plej ĝojigaj informoj, kiujn li faris, estis tiu pri la propono de CK de BEA, ke la 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en 1976 okazu en nia urbo.

B. Kavalĝiev

(El p. 2)

kaj diskriminacio, kontraŭ ĉiusecaj reakcio kaj obskurantismo, kontraŭ la imperiismaj militminacoj kaj militfajrujoj. La bulgaraj virinoj estas morale solidaroj kun ili kaj pretaj ankaŭ materiale helpi ilian batalon. Aparte aktivaj sur tiu ĉi kampo devas esti la bulgaraj esperantistinoj, uzante la riĉajn eblecojn, kiujn prezentas al ili la Internacia Lingvo.

Al vigla kaj fruktoduna laboro dum 1975 — la Internacia Jaro de la Virino!

ESPERANTO-KURSO EN VRACA

La esperantistoj en Vraca jam posedas E-klubojn en la tute nova Distrikta Junulara Domo. Ĉi-tie la 15-an de oktobro komenciĝis E-kurso por komencantoj kun gvidanto Simeon Krăstev, instruisto de franca lingvo en mezlernejo.

Li instruas la lingvon laŭ rekta aktiva metodo antaŭ 30 gekursanoj de aĝo inter 20 kaj 30 jaroj. Ofte estas uzataj sondiskoj kaj filmetoj. La lernolibro restas nur por hejmlaboro.

Ivan Gradinarski

KONCERTO DE M. ANGELOVA

La konata en niaj internaciaj E-kongresoj kantistino Maria Angelova donis koncerton la 21-an de novembro en Sofio. En la muzikprogramo estis komponaĵoj de famaj bulgaraj, rusaj, germanaj, italaj kaj francaj komponistoj.

Post la sukcesplena programo la talenta artistino ricevis florbukedojn de multaj ĉeestantoj.

La prezidanto de BEA Nikola Aleksiev varme salutis ŝin kaj deziris al ŝi pluajn sukcesojn en kaj ekster la lando.



JARKUNVENO DE ESPERANTISTOJ- FILATELISTOJ

Je la 18. XI. 1974 en jarkunveno de la Klubo de Esperantistoj-Filatelistoj „Amika Rondo“ — sekcio de BEA, oni traktis ĝian naŭmonatan agadon.

La kunveno ĉeestis la prezidanto de BEA — k-do N. Aleksiev, kiu pritaksis la laboron de la klubo kiel bonan kaj utilan.

Estis elektita estraro de la sekcio kaj re-dakta komitato de la bulteno „Kolektanto“: d-ro Boris Nedkov — prezidanto, Nikola Nikolov — vicprezidanto, L. Leviĉarov — sekretario, B. Popov kaj D. Biŝev — konsilantoj.

La jarkunveno unuanime proklamis la veteranon-esperantiston Ivan Daskalov kiel honoran prezidanton de la klubo „Amika Rondo“. Li estas unu el la fondintoj de la klubo de

esperantistoj-filatelistoj, ĝia unua sekretario kaj poste senĉesa prezidanto.

L. Leviĉarov

VIGLIĜO EN BATAK

E-Societo „Petăr Toŝkov“ en u. Batak vigligis lastatempe. Per la loka radioservo ni legis dufoje la prelegon „La mondo havas internacian lingvon“. Oni ilustris ĝin per belaj Esperantaj kantoj. Pere de la radioservo ni anoncis E-kursojn.

Rezulte de nia propagando ni malfermis tri kursojn: por komencantoj ĉe la kulturdomo, gvidas ĝin Angel Kănev, partoprenas 15 civitanoj; por komencantoj en la elementa lernejo „Todor Kolarov“ kun 13 ĝelernantoj — gvidata de Veneta Petrova, direktorino de la lernejo, kaj kurson por progresintoj, gvidata de Vasil Petrov.

Vasil Petrov

Pli ol 200 seriozaj E-kolektantoj de filatelajoj, esperantajoj, numizmatikaĵoj, bildkartoj k. a. deziras kontakti kun kolektantoj tutmonde. Sendu vian ononcelon, proponojn kaj kondiĉojn. Oni publikigos ilin en bulteno „Kolektanto“ senpage, sendepende ĉu vi estas aŭ ne membro de la Filatela Klubo „Amika Rondo“. Ne prokrastu! Skribu tuj!

Bonvolu turni vin al adreso: Bulgario, Sofia — 13, poŝtkesto 5, Klubo de Esperantistoj-Filatelistoj „Amika Rondo“.

RIĈA KAJ VARIA E-AGADO EN ŜUMEN

Antaŭ nelonge en la junulara domo okazis la II-a distrikta konferenco de la esperantistoj en Ŝumen. En ĝia laboro partoprenis k-do Stojan Kostadinov — sekretario de CK de BEA, k-dino Bakărgieva el DK de la Patrolanda fronto, docento Georgi Dimov — prezidanto de DK de BEA en Varna, k. a. Raporton pri la agado legis la prezidanto de DK Atanas Bojaĝiev.

La konferenco koincidis kun la Monato de la Bulgara-Soveta Amikeco en nia lando, tial ĝi estis dediĉita al la multjara amikeco inter la ŝumenaj kaj sovetaj esperantistoj. Estis aranĝita ekspozicio, kiu per multe da ricevitaj leteroj, literaturo, gazetoj, memoraĵoj k. a. manifestis la ekzistantajn fortajn ligojn inter ili.

Plej karakteriza por la distrikta E-organizaĵo dum la lastaj du jaroj estas la plua fortikiĝo de ĝiaj vicoj, ĝia stabiligo kiel aŭtoritata kulturkleriga organizaĵo. Dum tiu periodo estis kreitaj 2 novaj societoj: en u. Kaspican kaj en u. Preslav. DK de BEA en Ŝumen senĉese plibonigas sian stilon kaj metodon de laboro, serĉas vojojn por altirado de novaj membroj, por kreo de lokaj instruistoj ktp.

En la raporto meritplenan atenton oni dediĉis al la internacia korespondado, ĉar per

Esperanto disvastiĝas en la mondo la vero pri la florado kaj la ĉiufilankaj sukcesoj de socialisma Bulgario, kreskas la nombro de ĝiaj amikoj inter la honestaj, demokratiaj homoj en ĉiuj landoj.

Dum la raportita periodo aparte bonajn ligojn la esperantistoj en la distrikto de Ŝumen kreis kun la esperantistoj el USSR. Per la helpo de la Distrikta Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco estis preparitaj kaj senditaj salutleteroj al centoj da sovetaj amikoj kaj societoj lige kun la datreveno de la Granda Oktobra Revolucio kaj la 50-jariĝo de USSR. Organizita estis renkontiĝo de la esperantistoj el nordorienta Bulgario. La societo „Progreso“ ĉe la Aŭtomobila Uzino „Madara“ en Ŝumen, kune kun DK de la Komitato por Pacdefendo organizis gastadon de delegitaro de la Vjetnamia Esperantista Pacdefenda Asocio.

Dum la konferenco okazis viglaj diskutoj. Estis faritaj valoraj proponoj por plibonigo de la estonta laboro. Oni substrekis, ke unua tasko de ĉiuj esperantistoj estas ilia aktiva partopreno en la socia, kultura kaj produktada vivo de la lando, por ankoraŭ pli granda vigligo de la E-movado en nia distrikto kaj en la tuta lando. Je la fino estis elektita nova

distrikta komitato kaj senditaj saluttelegramoj al DK de BKP, CK de BEA kaj al la E-ko-

misio de la Asocio de Sovetaj Amikocietoj en Moskvo (SSOD).

Dimitar Minchev

La membroj de E-societo „Vekiĝo” — u. Ŝumen, organizis diversajn aranĝojn por inde celebri la 30-an datrevenon de la Socialisma Revolucio en nia lando. Ilia deziro estis, festante tiun ĉi gloran jubileon, konatigi al ĉiuj siaj amikoj en eksterlando la sukcesojn de nia lando, marŝanta sur la vojo de socialismo kaj en la unuaj vicoj de la batalo por paco kaj socia progreso. Tial frue ni donis anoncojn en multaj Egazetoj kaj en „Bulgara Esperantisto”, per kiuj ni invitis ĉiujn alilandajn amikojn, kiuj vizitis Bulgarijon, skribi siajn impresojn pri ĝi.

Kaj la leteroj ne malfruis. Ĉiutage al la adreso de la Societo venis leteroj kaj poŝtkarto el diversaj landoj, inkluzive el tiaj malproksimaj kiel Japanio kaj Brazilio. Skribis homoj de diversaj ago kaj profesio, kun

diversaj konvinkoj, sed penetritaj de sincera amikeco al socialisma-Bulgario, al nia laboremaj kaj liberaj herooj popolo. Entute mi ricevis pli ol 80 leterojn. La plimulto estis de sovetaj esperantistoj. La plej interesaj estis voĉe legitaj dum du letervesperoj. Pri tiu ĉi bona iniciato estis vaste informita la urbanaro de Ŝumen per la lokaj ĵurnalo kaj radioreto.

En speciala kunsido la estraro de Societo „Vekiĝo” aljuĝis premiojn por plej riĉenhavaj leteroj al la jenaj amikoj: Adolf Ŝvarc el Heilbronn (FRG), Petro Poliŝĉuk el Taŝkento, USSR, Ilze Liehel el Berlino, Kurt Berndt el GDR kaj la E-kluboj de la ĝemelaj urboj Debrecen — Hungario kaj Pŝerov — ĈSSR. Al la premiitoj ni sendis belajn bulgariajn memoraĵojn kun bondeziroj pri sano kaj sukcesoj en la plifirmigo de nia amikeco.

Cvjetko Todorov

Amika letero el FRG

*Al Esperanto-Societo „Vekiĝo”
P. K. 60, Ŝumen, Bulgario*

Heilbronn, 11. 7. 1974

Estimataj geamikoj,
Dufoje en mia vivo mi vizitis Bulgarijon. La unuan fojon kontraŭvole — kiel soldato de la germana faŝista armeo — mi senutile gardis la marbordan aviadilejon ĉe Kavala. Pro mia kontraŭmilita agado inter la soldatoj mi riskis mian kapon, savis min nur la translokiĝo al Sofio. Tie mi travivis la kruelajn bombajn atakojn de anglo-usonanoj. Iun tagon mezaĝa bulgarino min vee alkrulis sur la strato: „Kion do vi faras, vi, germanoj?!” Vere, kion mi povis fari? Kion? Kiel soldato, kiel homo? Ĉu mi povis revivigi la frakasitojn, la mortigitojn, kiuj amase kuŝis senferke sur la ŝtonaj plankoj de la preĝejoj? Ĉu mi povis ripari la detruitajn domojn? Nenion mi povis fari tiutempe.

Sed vi, la posteuloj, la nova generacio, kune kun la maljunuloj, vi riparis la damaĝojn, vi, post la liberiĝo, post la forpelo de la reĝimo burĝa, kreis novan ordon, vian socialisman ordon per la helpo de la sovetaj armeoj kaj popolo. Kaj vi ne forgesas la oferojn, ne forgesas la heroan kontraŭstaron, ne forgesas la mortigitajn partizanojn, kiuj per sia batalo ebligis al vi vian hodiaŭan esperplenan estontecon. Tion mi konstatis ĉe mia dua libervola vizito en via bela, saniga lando kiel turistoj en junio 1974. Oni demandis min pri la diferenco inter 1944 kaj 1974. Kia demando! Jen mia respondo: la bulgara popolo, la laboristoj, la kamparanoj, la ofi-
cistoj, iliaj homaj kvalitoj restis. La bulgarioj restis same bonaj, gastamaj, bonkoraj!

Estas kortuŝe ree kaj ree travivi, kiel la infanoj, demanditaj pri vojo, donas informojn kaj tion ajn, kion ili havas — florojn, rozojn, fruktojn — al fremdulo, al gastoj en la lando. Mirinda estas la energio, la firma volo de la popolo en la konstruado de domoj, fabrikoj, kulturaj konstruaĵoj; respektinda estas la korekteco, la pureco, la progreso, videbla en ĉiu strato, vilaĝo kaj urbo. Ĵojigas la freŝeco de la geknaboj.

Do, bone notu en la memoron: gardu zorge vian naciajn kvalitojn. Ne kredu, ke importita solvebla kafo estas preferinda al la bulgara tipo, ke brila kovrilo nepre umas superan enhavon.

Gardu viajn historiajn trezorojn, viajn solidajn kutimojn, vian boncelan laboremajn, vian amikecon kun la tutmonda proletaro. Gardu bone la ĉevojajn fontojn, la arbar-riĉajn montarojn, la ĝardenojn kaj la fruktodonajn kampojn. Disvolvu plue la lernemon ĉe junuloj kaj maljunuloj, la akiron de teknika perfekteco kaj ampleksa scienco, disvolvu la industrion kaj agro-mastrumadon, la bazon de ĉiu nacia vivo. Multajn landojn mi vidis dum vojaĝoj — kaj kapitalismajn, kaj socialismajn. Mi konfesas sen flati: Bulgario iras laŭ ĝusta vojo al sekura estonteco. Bulgario, teritorie malgranda, okupas indan lokon inter la popoloj de la mondo.

Mi ŝatas Bulgarijon, ĝian socialisman ordon! Mi revidos ĝin!

*Saluton!
Adolf Schwarz*



TRA LA E★ MONDO

CELEBRO DE NOVA BULGARIO EN NOVOSIBIRSK

En septembro ĉ. j. la Novosibirska E-Klubo aranĝis solenan kunvenon dediĉi an al la 30-jara jubileo de socialisma respubliko Bulgario. Ĉeestis la kunvenon multaj esperantistoj kaj ankaŭ neesperantistoj.

Pri la vivo kaj la sukcesoj de nuntempa Bulgario parolis la prezidanto de la klubo V. Sibircov. Pri la agado kaj la nunaj taskoj de la bulgaraj esperantistoj informis la klubano A. Smolin. La belarta programo konsistis el materialoj, kiujn ni ĉerpis el revuo „Bulgara Esperantisto“ (ĉiuj klubanoj estas ĝiaj abonantoj). Inĝeniero L. Osinkina recitis parkere la versaĵojn „Mia patrujo“ de Danĉo Danĉev kaj „Fabelo“ de Damjan Damjanov. Estis recititaj ankaŭ la versaĵo „Turisto-esperantisto“ de Simeon M. Simeonov, fragmentoj el la poemo „Septembro“ de Geo Milev k. a.

Oni faris anoncojn pri turistaj vojaĝoj al Bulgario estorte.

En la kunveno regis sincera sento de amikeco kaj amo al la frata bulgara popolo.

A. Smolin

EN KRONACH

Delonge, kiam mi ricevis faldfoliojn pri Kronach, naskiĝurbo de la plej granda renasanta germana pentristo, la mondfama Lucas Cranach, mi revis viziti tiun ĉarman mezepokan urbeton.

Kaj — jen... la revo efektiviĝis! Ĝuste tiun ĉi urbeton, kaŝitan en belega valo en la plej norda parto de Bavarujo, la germanaj esperantistoj elektis por la ĉi-jara oficiala

**115 jaroj ekde la naskiĝo de
d-ro L. L. Zamenhof**

LETERO DE D-ro ZAMENHOF

Al la redakcio de gazeto „DANUBO“

La unuan numeron de „Danubo“ mi danke ricevis. Mi deziras al la nova gazeto plej bonan prosperon. La nova organo, kiu per Esperanto ligas kelkajn popolojn, restos ĉiam simbolo de intergenta paco kaj amo.

Noto de la Redakcio. Gazeto „Danubo“, komuna organo de la rumana kaj bulgaraj esperantistoj, aperadis de oktobro 1910 ĝis julio 1912. La supra letero de Zamenhof estas publikita en n-ro 2, 1 jaro, novembro, 1910.

postkongreso.

Apenaŭ ekzistas pli oportuna loko por interkonatiĝo ol la pitoreska frankonia arbara perlo Kronach. Ĝi allogis preskaŭ 150 hamburgajn kongresanojn el 19 landoj, inter kiuj tiel malproksimaj kiel Japanio, Brazilo, Usono, Kanado k. a.

☛ Vere mirinde estas, kiel nur kelkaj esperantistoj, ĉekape kun la ĉefdelegito de UEA Ludoviko Robel kun sia tuta familio, same esperantista, sukcesis aranĝi tiel brilan postkongreson!

Entute la programo estis tre riĉe aranĝita. Solena akcepto en la bela urbodomo, surpriza renkonto de la publiko kun la lokaj aŭtoritatoj, ĉiutagaj vesperaj renkontoj en la kongresejo mem, lumbildprezentado, plaĉega folkloro vespero, kiam oni merite ovaciis la organizantojn kaj samtempe ĉiu partoprenanto gajnis — pere de loterio — belan donacon.

Neforgesebla restas la promenado tra la romantika Kronach kun ĝiaj malnovaj placoj, turoj, preĝejoj, ĉarmaj mallarĝaj stratoj kaj malnovaj domoj, spegulantaj sin en malgrandaj riveroj, kaj la vizito de la tre malnova, pli ol 800-jara, majesta fortikaĵo Rosenberg (Rozomonto).

Mi nur mencias pri la tri belegaj tuttagaj ekskursoj al: Coburg — revo! — 1000 jarojn da arto kaj kulturo, precipe ĝia imperiestra katedralo kun la mondfamaj skulptaĵoj de Balthasar Neumann; la bavara pupurbo Neustadt kaj ankoraŭ multe da interesaj lokoj.

Ne estis facile adiaŭi kun tiu ĉi belega loko, kun ĉiuj ĝeamikoj, novaj kaj malnovaj.

Al la sindomemaj gesamideanoj el Kronach koran dankon!

*Katja Maneva
pentristino*



Bialistok (Esperante Bjalistoko, ruse Bjelostok), urbo en la pola parto de Litovio, kie Zamenhof naskiĝis kaj pasigis la jarojn de sia infaneco, 1859—1873. La naskiĝdomo staris en la juda kvartalo, en strato nomata Jatke-Gas (judlingve: strato de la viand-butikoj), ekde 1919 Ulica Zamenhova (Zamenhof-strato). La domo staras ankoraŭ nun, sed izole; ĉiuj aliaj en tiu strato malaperis. Ĝi estas la sola domo en la tuta Zamenhof-strato.

La historio de tiu loko reiras al la 14-a jarcento. Ĝia nomo ekestis per kunligado de du vortoj: „Bialy“ („Blanka“ — la rivereto, kiu fluas en ĝi) kaj „Stok“ (la arbara monteto, kiu ĉirkaŭas la urbon). Post 500-jara ekzistado Bjalistoko fariĝis industria urbo; malgraŭ tio ĝi ne malbeliĝis, ĉar la du naturaj apartaĵoj, ĵus menciitaj, donas al ĝi plaĉan aspekton, mildigante la unutonecon de la ĉiutaga industria vivo. Interesajn historiajn allogaĵojn la urbo ne posedas, sed ĝi

ĝuas la reputacion kiel naskiĝloko de Zamenhof.

Kvin periodojn oni distingas en ĝia historio:

- | | |
|---------------------|------------|
| 1) litova periodo | 1320—1665, |
| 2) Branicki-periodo | 1665—1795, |
| 3) prusa periodo | 1795—1807, |
| 4) rusa periodo | 1807—1915, |
| 5) pola periodo | ekde 1919. |

Fondita de la litva duko Gedimin en la jaro 1320 kiel eta vilaĝo, ĝi transiris en 1665 en la posedon de la nobela pola familio Branicki, kaj tiam komenciĝis ĝia disvolvigo. En 1742 ĝi fariĝis urbo, kaj ĉirkaŭ tiu tempo — laŭ buŝa tradicio — grafo Branicki invitis judojn, ke ili tie ekloĝu. Forta puŝo antaŭen okazis en 1835 kun fondiĝo de la unuaj teksfabrikoj. De post tiam la urbo daŭre evoluadis, kaj la loĝantaro ĉiujare pligrandiĝis. En decembro 1859, kiam Zamenhof naskiĝis, Bjalistoko jam estis mezgranda industria urbo. Laŭ statistiko en la jaro 1860 ĝi havis 16 544 loĝantojn, el kiuj 11 288 estis judoj (68,3%). Estante granda plimulto, la judoj donis al la urbo la dominan noton. Estis ĉefe ili, kiuj iniciatis kaj evoluigis tiun fortan industrion. La rusa registaro rigardis Bjalistokon kiel unuan stacion ekster la limoj de la pola teritorio, pro tio ĝi favoris ĝian industrion kaj subtenis ĝin kontarŭ tiu de Lodz, precipe post la pola ribelo en 1863. En 1859 oni inaŭguris la fervojon Varsovio-Peterburgo, kiu trapasis Bjalistokon, kaj en 1867 estis konstruita nova fervoja linio: Bjalistoko — Brest-Litovsk. La urbo floradis. Ĝi fariĝis granda komerca kaj industria centro de teksaĵoj, tria post Moskvo kaj Lodz.

Korespondaĵo el la jaro 1863 priskribas la tiaman staton de la ekonomio: „Pogranda komerco floras en Bjalistoko, kaj ega aktiveco regas en ĉiuj branĉoj de la ekonomio. Teks-

La naskiĝdomo de L. L. Zamenhof



fabrikoj, movataj per vaporo, fondigis kaj fortikiĝis, dum la vapormaŝino estis ankoraŭ raraĵo en Rusujo. En la regiono de Bjalistoko kaj Bielsk ekzistas nuntempe pli ol 30 grandaj fabrikoj: ili ĉiuj estas forte ligitaj kun Bjalistoko, kaj la plej grandaj fabrikoj troviĝas fakte en la urbo mem. Ili prilaboras lanaĵojn kaj aliajn ŝtofojn laŭ valoro de 5 000 000 da rubloj ĉiujare. 90% de la fabrikantoj kaj komercantoj estas judoj. Kaj kune kun la plimultigo de la fabrikoj pligrandigis la urbo. Ĝi akiris famon kaj ĉiujare la loĝantaro grandigas. Dum la postaj jaroj la evoluo ne haltis kaj la loĝantaro pli kaj pli grandigis. En 1895 ĝi estis 62 993, inter ili judoj 47 783 (76%). Poste la juda loĝantaro laŭprocente malpliigis, tamen restis ĉiam plimulto. En 1932 estis 91 207 loĝantoj, judoj inter ili pli ol 50 000. La nejudaj loĝantoj ne estis homogenaj. Ĝi konsistis el poloj, rusoj, germanoj, litovoj, tataroj — dividitaj inter si per lingvaj kaj religiaj baroj. Ekzistis fremdeco inter la diversaj elementoj de la loĝantaro, kaj la intergentaj rilatoj estis neamikaj — faktoro, kiu forte impresis la junan Zamenhof kaj donis la direkton al ĉiuj liaj estontaj celadoj.

... La judoj havis sian apartan sorton. En julio 1905 okazis unua pogromo, farita de soldatoj, ĉe kiu 25 judoj estis mortigitaj. Dua, pli terura pogromo okazis komence de junio 1906 kaj daŭris 2—3 tagojn: aliginta popolamaso atakis la judojn, murdis, vundis kaj rabis; ankaŭ soldatoj partoprenis —

80 estis murditaj, pli ol 80 vunditaj. Zamenhof, en letero al Javal, menciis tiun „teruran kaj senekzemplan buĉadon“ (*Leteroj de Zamenhof 1*, p. 271), kaj pli detale en sia kongresa parolado en Ĝenevo (*Originala verkaro*, p. 370). Sed tiuj du okazoj paligis kontraŭ tio, kio venis 35 jarojn poste, en 1941, kiam germanaj trupoj konkeris la urbon kaj turnis sin kontraŭ la judoj kun neimagebla teroro. Preludo okazis tuj: pli ol 2000 viroj estis kolektitaj kune en unu sinagogon, enŝlositaj kaj forbruligitaj. Post tio la germanaj soldatoj ĵetis sin kiel sovaĝaj bestoj sur la ceterajn, murdante virojn, virinojn kaj suĉinfanojn en iliaj luliloj. Sekvis aliaj sennombraj kruelaĵoj, unu pli terura ol la antaŭa, ĝis fine en Bjalistoko ĉiuj judoj — ĉirkaŭ 60 000 — estis ekstermitaj. Restis en la urbo nur du silentaj atestantoj: la malnova juda tombejo, kaj la nova — la geto-tombejo.

La juda karaktero de Bjalistoko jam ne ekzistas. Tiu medio tute melaperis. Sed iam — meze de la 19-a jarcento kaj plue — vigla juda vivado pulsadis en la urbo. La materia stato estis bona, pli ol ie en Litovio. La intelekta vivo ankaŭ floradis. Sed la intergentaj rilatoj restis malbonaj, eĉ malamikaj. Kaj ĝuste tiu negativa atmosfero de Bjalistoko turmentis la animon de la knabo Zamenhof, instigante lin krei dum postaj jaroj la komunan, internacin lingvon.

El „*Esperanto*“, 12/1972
(Kun kelkaj mallongigoj)

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la Novan 1975-an Jaron al siaj multnombraj legantoj en kaj ekster la lando! Ĝi bondeziras al ili sanon, feliĉon kaj novajn, ĉiam pli grandajn sukcesojn sur la kampo de Esperanto kaj en iliaj noblaj laboro kaj batalo por amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj, por paco en la tuta mondo!



IUJ METODIKAJ DEMANDOJ DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

de Violin Oljanov

(Daŭrigo el n-ro 10—11)

Ne instrui kune samspecajn lingverojn!

Kiam oni asertas, ke Esperanto estas facila, oni ĉiam devas konsideri, ke tio ne estas absolute vera. Tio estas nur relative ĝusta — se oni komparas ĝin kun aliaj lingvoj. Sed Esperanto, kiel ĉiu lingvo, estas komplika socia fenomeno, ĉar ĝi reflektas la homan penson, la rilatojn inter la homoj, la rilaton de la homo al la ĉirkaŭa medio, kiuj estas tre komplikaj aktivecoj.

Konsiderante tiun malsimplecon de la materialo, la lektoro ĉiam devas havi mezuron necesan por la regula adopto kaj ĝusta uzo de la instruata materialo. Se oni erarus en tiu mezuro, la rezulto estus intermiksigo de la formoj. Aparte oni devas atenti pri la samspecaj lingvaj elementoj, ekzemple pri la *demandaj vortoj*. Ili estas tre gravaj en la instruprocezo. Pro tio la nesperta kursgvidanto rapidas instrui ilin opiniantes, ke tiumaniere li faciligos la pluan iron de la instruado. Sed la rapideco estas danĝera. Ĝi povas konduki al malaj rezultoj. Oni ne devas transiri al *tiu*, se oni ne estas certaj, ke la kursanoj ne nur bone komprenis la demandon *kio*, sed bone, profunde ĝin adoptis post longaj konversaciaj ekzercoj kaj povas jam facile ĝin uzi. La samo validas pri la ceteraj demandvortoj, precipe pri la adverboj, ofte erarataj de la lernantoj. Ĉiukaze en unu duhora leciono ne estas instruendaj pli ol du demandvortoj.

Tiu principo — ne instrui tuj ĉion de unu kategorio — estas utila kaj validas preskaŭ pri ĉiuj gramatikaj kategorioj, kaj ne nur pri ili: ĝi ril-

tas ankaŭ al la samspecaj leksikaj grupoj. Ĝi estas des pli grava, ĉar la komencantaj E-instruistoj, tuŝante iun gramatikan kategorion aŭ leksikan grupon, prezentas ilin al la lernantoj de la komenco ĝis la fino kaj tiumaniere donas nedigesteblan porcion, kiu difektas la stomakon, t. e. la lernantoj ne povas ĝin bone memorfiksi kaj regule uzi.

En mia praktiko mi konstatis, ke estas utile instrui la personajn pronomojn en du lecionoj: unue nur *mi, ni, vi*. Ili estas plej necesaj en la konversacia laboro. Nur post ilia bona kaj senerara ellerno oni devas transiri al la ceteraj. Sammaniere estas instruendaj la nomoj de la tagoj, de la monatoj — ne per tuj deklamado, sed en konversacio dum du aŭ tri lecionoj.

Iuj pensas: la verbotempoj en Esperanto estas tre simplaj (*-as, -is, -os*), kaj oni povas tuj lerni ilin. Nenio pli erara ol tia opinio! Ni ofte renkontas esperantistojn, novajn kaj ne tute novajn, kiuj miksas tiujn formojn (dirante *-as* anstataŭ *-is*, aŭ *-is* anstataŭ *-os*). Ili eble lernis ilin kune aŭ en tre proksimaj lecionoj. Estas necesa longa ekzerco de unu formo antaŭ ol transiri al nova.

Pro la samaj kaŭzoj oni ne devas instrui kune samspecajn, proksimspecajn, aŭ simile sonantajn lingverojn. Tio aparte validas pri la afiksoj, la prepozicioj, la konjunkcioj. Do, oni ne instrui kune *-ind* kaj *-end*, *-ec* kaj *-aĉ*, *dum*, *tra* kaj *trans*, *pri*, *per* kaj *pro*, *apud* kaj *ĉe* ktp.

Tre grava elemento en la instruoprocezo estas la *ripetado* — konstanta, sistema, ĉiuhora, multfoja ripetado de la formoj kaj la vortoj. Ties graveco

en la lingvosistemo aŭ en la metodo difinas la multoblecon de ilia ripetado.

Kiel instrui la akuzativon

La plej malfacila momento en la instruado de Esperanto al bulgaroj estas la akuzativo. La kaŭzo — ĝia manko en la bulgara lingvo. Pro tio niaj samlandanoj malfacile ĝin komprenas, malfacile atingas ĝian regulan uzadon. Aparte malfacila estas tio por homoj sen lingva kulturo, sen sufiĉaj gramatikaj konoj, sen bona kono de la gepatra lingvo.

Pro tiuj kaŭzoj ĉiu lektoro devas bone pripensi kiel ellabori sian sistemon por konigi la Esperantan akuzativon al la kursanoj.

La maniero de la instruado, kompreneble, dependas de la kultura, klereca kaj lingva nivelo de la aŭskultantaro.

Tre ofta eraro estas, ke oni komencas per akuzativo ĉe la substantivo. Plej ĝenerala kaj konata regulo estas, ke oni devas iri de konata kaj facila materialo al nekonata kaj pli komplika. Plej facile asimilebla por la bulgaraj esperantistoj estas la akuzativo de la personaj pronomoj, ĉar ĝi ekzistas ankaŭ en la bulgara lingvo. Pro tio ili sentas, ke en la frazo „mi tuŝas ŝin“ mankas io, kaj ne sciante la formon „ŝin“, ili ofte skribas „ŝia“. Do, ili akceptas la akuzativan formon en tiu kazo kiel naturan. De tie estas facile anstataŭigi la pronomon „ŝin“ per la substantivo *lernantino*. Jam laŭ la logiko ili perceptas nature tiun nekutiman por la bulgara lingvo formon. Por klarigi kaj motivigi ĝisfine la regulon, oni memorigas la instruitan antaŭ tio regulon pri la Esperanta frazo (ekz. mi estas lektoro; estas mi lektoro; estas lektoro mi; mi lektoro estas; lektoro estas mi; lektoro mi estas). Laŭ tiu regulo, sen la akuzativa finaĵo „n“ oni ne povas kompreni, kiu estas tuŝata. Tiamaniere la kursanoj komprenas la neceson de la akuzativo ĉe la sub-

stantivoj. Poste oni nature iras al la akuzativo ĉe la adjektivoj kaj la korelativaj pronomoj.

La akuzativo de direkto estas instruenda nur post plena certeco pri la adopto de akuzativo de rekta objekto. Tie ĉi oni konstruos la lecionon sur multaj ekzemploj, montrante paralelajn formojn de direkta akuzativo kaj adjekto (cirkonstanca komplemento): Sur la strato la advokato metis la ĉapelon sur la kapon. Kien? — sur la kapon. Kie? — sur la strato. Dependende de la nivelo de la kursanoj oni povas menciigi ilin kompari kun la identaj rusaj kaj germanaj formoj.

Sen detaloj

Estas kursgvidantoj, kiuj deziras diri al la kursanoj ĉion, kion ili scias. Tio estas malutila praktiko, ĉar ĝi pezigas la materialon kaj tedas la aŭskultantojn. Oni devas havi mezurilon ĉe la klarigoj ekzemple pri la deveno de iuj vortoj, aŭ ĉe komparoj kun aliaj lingvoj. Kompreneble, oni povas fari tiajn komparojn, tamen ili estus utilaj, se oni komparus kun lingvoj, kiujn ĉiuj ĉeestantoj konas.

En kurso de komencantoj oni devas prezenti la gramatikajn regulojn en plej elementa formo. Sufiĉas, se oni montras, ke *-ist* signifas profesion, *-aj* — konkretan objekton, *-ec* — kvaliton, abstraktan substantivon, ke *-ig* — egalas al faras, *-iĝ* — faras min ktp. Ne estas necese eĉ instrui ĉiujn afiksojn aŭ ĉiujn gramatikaĵojn, ekz. la malsimplajn verboformojn.

En la daŭriga kurso ni jam kompletigos kaj precizigos la regulojn, la signifon de la afiksoj kaj aliaj lingveroj. Tie ĉi mi ne parolas pri la tiel nomataj „novaj afiksoj“, kiuj estas eterne novaj. Ĉar la praktiko ne akceptas ilin kaj ties konatigo al la kursanoj ne nur ne estas necesa, sed estas rekte malutila.

La dirito pri la gramatikaĵoj validas ankaŭ pri la vortoj. Oni ne devas

Gaje



Hej, ki-e-nas vi sen la-co, ka-me-ra-do E-ri-
na-co? Ki-on ce-las vi re-zul-te?
Por-tas mi da pin-gloj mul-te al sci-u-roj tri-fra-ti-noj,
di-plo-mi-taj taj-lo-ri-noj.
Dum mi-nu-toj kvin:trik-trak! — es-tos pre-ta vi-a frak?

Distroĵ

Modesteco de scienculo

La fama bibliotekisto Djuval estis konata pro sia modesteco. Foje iu profanulo demandis lin pri io, kaj la scienculo respondis:

— Pri tio afero mi nenion scias.

— Tamen oni pagas al vi por scii, — ĉikanis la malklerulo.

— Oni pagas al mi, — rediris la bibliotekisto, — por tio, kion mi scias. Se oni pagus al mi por tio, kion mi ne scias, tiam ĉiuj trezoroj de nia lando ne sufiĉus.

Provincano en Parizo

Iu provincano venis al Parizo. Li eniris en luksan restoracion. La kelnero rapidis doni al li la karton kun la menuo.

— Mi havas nur 10 frankojn, — diris la provincano, — kion vi povas rekomendi al mi?

— Alian restoracion, sinjoro, — respondis severe la kelnero.

El la franca: Rosica Valĉanova

(El p. 15)

Sargi la lernantojn per multaj novaj vortradikoj. 15-20 vortoj en duhora leciono estas sufiĉa kvanto. En la elementa kurso ne necesas, ke oni malkovru la tutan enhavon de la vortoj, ĉiujn iliajn signifojn. Sufiĉas la baza signifo aŭ la konkreta, kiun la vorto havas en la leciono. 400-500 vortradikoj por unu kurso tute ne es-

tas malgranda kvanto. Konsiderante la Esperantan vortfaradon, tio egalas al kelkmiloj da vortoj. Tion oni ne povas atingi en unujara instruado de nacia fremda lingvo. En ĉiu okazo ĝi prezentas solidan bazon por plua konkero de lingvoscioj, ĉu en daŭrigaj kursoj, ĉu aŭtodidakte. Kaj la celo de la elementa kurso ja devas esti tia.

(Daŭrigota)



Horizontale: 2. Kombi. 7. Kseno (font).
9. Not. 10. Vip. 11. Nov. 13. Retra. 14.
Dek. 15. Op. 17. Lia. 18. Sekig. 20.
Naŭ. 22. Kloro, 23. Etr. 24. Monto.

Vertikale: 1. Ekvinosko. 2. Kepro. 3.
On. 4. Montriĝas. 5. Invadi. 6. Strukturo.
8. Si. 12. Or. 16. Pel. 17. Liro. 19.
Kom. 20. Neo. 21. At.

Diagonale (de 1): ESPERANTO

Vizitkarto

Esperantisto, Samokov

Stelenigmoen n-ro 9

I — II=januaro	IV — V=higieno
I — V=jupo	IV — III=hobi'
II — III=serenad'	V — I=rekordo
II — I=suna	V — IV=rozo
III — IV=talento	
III — II=togo	

la ĉeno: *Tridek jaroj Popola Respubliko Bulgario*

Je la 20-a de septembro ĉ. j., post turmenta malsanado, forpasis nia bonega samideanino kaj kamaradino

Donka Maksimova

naskita en 1919

Ŝi venis en urbon Varna en 1940, plena je entuziasmo kaj volo por batalo kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio — por hela estonto. Ŝi eklernis Esperanton kaj verve partoprenis en la organiza kaj kultura vivo de E-Societo „Albato“.

La abnegacia agado kontraŭ la sangavida faŝismo estis esenco de ŝia imitinda vivo. Ŝi agitis, organizis, kolektis monsumojn kaj amilojn por la batalo, helpis al la partizanoj.

Ni ne forgesos la bonkoran rideton, kun kiu ŝi plenumis ĉiun ajn danĝeran laboron, ŝian fratinecan rilaton al la kamaradoj!

Post la liberiĝo kun la sama entuziasmo. Donka gaŭrigis sian aktivecon en la konstruado de la nova vivo.

Tre frue la morto forprenis ŝin el niaj vivoj, ĉar ŝi povis ankoraŭ multon doni.

Ni memoros ŝin kaj ŝian vivon, kiu estas modelo en nia Esperanta kaj socia aktiveco!

V. Oljanov

En la semajna junulara populara teknika ĵurnalo „Orbita“ (4. V. 1974): artikolo „Kio nova en Esperanto?“ Interesaj informoj pri la vortriĉeco de Esperanto surbaze de „Plena Ilustrita Vortaro“.

En j. „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (14. VI. 1974): informo de Fani Mihajlova pri la solena kunveno en Velingrad memore al la esperantisto de la urbo, perentaj en la kontraŭfaŝisma batalo.

En la sama ĵurnalo (9. VII. 1974): informo „La novaj taskoj de la esperantistoj en Plovdiv“ de Fani Mihajlova — pri plenkunsido de la Distrikta E-Komitato, traktinta la kulture agadon de la E-societoj en la Distrikto. En la sama numero artikolo: „La libereco havas sian prezon“ de Hristo Didov — pri la heroo vivo kaj morto de Dimităr Petrov-Fanteto, perinta kiel partizano. Oni mencias ankaŭ la E-agadon de la heroo.

En la sama ĵurnalo (8. X. 1974): informo de Nikola Jivondov pri la elmontoj de la lernanta estrada E-orkestro „Feliĉaj Floroj“ en u. Asenovgrad.

En j. „Oteĉestven Front“ — Sofia (14. VI. 1974): artikolo de Jordan Aleksandrov — distrikta korespondanto de la ĵurnalo en Varna, pri la kultura agado de Dimităr Zlatarski en u. Dălgopol. Oni mencias ankaŭ lian E-agadon.

La sama ĵurnalo (30. VIII. 1974) en la rubriko „Kuriozaĵoj“ aperigas artikolon pri la francino Mari Marvin (1875—1955), kiu akiris 70 sportajn distingojn kaj manifestis sin ankaŭ kiel artistino kaj verkistino. Oni mencias, ke ŝi scipovis ankaŭ Esperanton.

En la sama ĵurnalo (16. IX. 1974), en la rubriko „Esperanta Globo“ du informoj: pri Bulgara E-Teatro (la geartistoj Belka Beleva, Anani Anev, Mihail Ĉobanov) en Taragona dum la kongreso de IFEF de Marin Marinov. kaj pri celebulo de esperantistoj el Velingrad, perelintaj en la kontraŭfaŝisma batalo — de ing. Bojdar Leonov.

En j. „Cerveno zname“ u Vidin (15. X. 1974) sub la modesta titolo „Kurso de Esperanto“ — bone argumentita artikolo de Ignat Nikolov, prezidanto de la loka E-Societo.

En j. „Ŝumenska Zarja“ — Ŝumen (25. VI. 1974): artikolo sub titolo „Leteroj el Portugalio“ de la esperantisto Cvjatko Todorov. La leteroj spegulas la tutpopolan ĝojon pro la forigo de la duonjarcenta faŝista diktaturo en tiu lando.

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko KONKOVSKI

Korektis: Minko Konkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

En la sama ĵurnalo (8. X. 1974): ampleksa artikolo „Ili havas multe da amikoj“ de Cvjatko Todorov — pri la vigla kaj utila inter-nacia korespondado de la esperantistoj en Sumen. En la sama numero: informoj ankaŭ pri la vigla korespondado inter la esperantistoj en la ĝemeligitaj urboj Magdeburg (GDR) kaj Sumen.

En „**Informa Bulteno**“ de la Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro № 10—11 (junio 1974): eldiroj de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA, en la komitat-kursido de la 17-a de aprilo 1974.

En ĵ. „**Preslavskaja Tribuna**“ — u. Preslav (2. VII. 1974): informo de ing. Stilijan Stilijanov pri la fondo kaj la agado de E-Societo „Ivan Kádev“ en u. Preslav.

En ĵ. „**Večerni Novini**“ — Sofia (16. VII. 1974): informo de Konstantin Genčev pri so-ena inaŭguro de la E-Domo en Pazarĝik.

En la sama ĵurnalo (26. VII. 1974): ĝener-alaj informoj pri la 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

En la sama ĵurnalo (2. X. 1974): konciza informo pri la nova lernejo de la korespon-daj E-kursoj por instruistoj.

En la sama ĵurnalo (10. X. 1974): mallonga informo pri elementa E-kurso de la Sofia In-struista E-Societo „Dičo Petrov“.

En ĵurnalo „**Rodipski Ustrem**“ — Smoljan (16. VII. 1974): fotografoj pri la inter-naciaj E-kursoj en v. Pisanica, apud Smoljan. La tekston faris Georgi Hristov, la fotojn — Stojan Krátev.

En la sama ĵurnalo (6. VIII. 1974): informo „Tendaro ĉe lago Balaton“ de Todor Enčev — pri gastado de 30 junpioniroj-esperantistoj el la distrikto de Smoljan en la Internacia Jun-pionira Tendaro ĉe la bordoj de la lago Bala-ton, Hungario.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (26. VI. 1974) informo pri la forveturo al Hamburgo de la delegitaro de BEA por partopreni la 59-an UK de Esperanto.

En la sama ĵurnalo (3. VIII. 1974): informo de Bulgara Telegrafa Agentejo pri sukcesa spektaklo de la Bulgara Esperanta Teatro dum la E-Kongreso en Hamburgo.

En la sama ĵurnalo (24. VIII. 1974) granda artikolo „Bulgara spektaklo en Hamburgo“ de la konata bulgara ĵurnalisto Mihail Šakle. Li recenzas tre favore la spektaklon de BET, kiun li persone spektis, kaj prognozas novajn sukcesojn.

En la sama ĵurnalo (25. X. 1974): informo de Bulgara Telegrafa Agentejo pri torveturo de Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM, al Moskvo por partopreni je la nomo de MEM la Sesio okazante de la unua datreveno de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj.

En ĵ. „**Pravna Tribuna**“ — Sofio (7. VIII. 1974): artikolo „La Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo kaj la taskoj de la biljaraj esperantistoj-Juristo“ de G. Genčev.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — u. Loveč (21. V. 1974): granda artikolo „La esperantistoj en Loveč“ de Ilia Ivanov, prezidanto de la loka E-societo. En la sama numero: in-formo pri konferenco de la Distrikta Komitato en Loveč.

En la sama ĵurnalo (8. VIII. 1974): informo pri la partopreno de 6 junaj esperantistoj el Loveč en la Internacia Junulara Arkeologia E-Laborbrigado sur promontoro Kaliakra ĉe Nigra Maro.

En la sama ĵurnalo (17. VIII. 1974): granda artikolo pri la teroro de la faŝista hunto en Ĉilio, tradukita el Esperanto de Ilia Ivanov.

En ĵurnalo „**Narodna Kultura**“ (31. VIII. 1974): rememoroj de Georgi Stojanov — Bigor pri lia kulturkleriga agado en la pasinteco. La aŭtoro mencias ankaŭ sian E-agadon.

En la instruista semajna gazeto „**Uĉitel'sko Delo**“ (3. IX. 1974): granda informo pri la nova semestro de la korespondaj porinstrui-staj E-kursoj, komencaj la 1-an de oktobro.

En ĵ. „**Dimitrovgradska Pravda**“ — u. Dimitrovgrad (19. IX. 1974): salutletero de la esperantistoj el u. Taškent, Uzbeka SSR al la esperantistoj en Dimitrovgrad okazante de la 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en Bulgario. En la sama numero: letero de la soveta esperantistino Tatjana Kuvčenskaja el u. Dimitrovgrad, Uljanovsk-regiono — USSR, al la redakcio de la ĵurnalo. Ŝi turnas sin al la esperantistoj en la bulgara urbo Dimitrovgrad kaj proponas reciprokajn per-leterajn ligojn.

En ĵ. „**Krajgraniĉna Iskra**“ — u. Boljaro (30. IX. 1974): informo pri E-kurso kun klarigoj pri la lingvo Esperanto.

En ĵ. „**Svilozna**“, eldonata en la Kemia Uzino en u. Svištov (27. IX. 1974): informo pri la partopreno de junuloj-esperantistoj el la Kemia Uzino en la Internacia esperantista renkonto en Budapeŝto. La renkonton parto-prenis gastoj el 8 landoj.

En la sama ĵurnalo (21. IX. 1974): informo pri malfermata E-kurso en la uzino.

Abonigu viajn amikojn kaj konatojn al „Bulgara Esperantisto“! Abonigu nepre vian eksterlandan amikon — per nia organo li pli bone konatiĝos kun nia Esperanto-movado, kun nia lando kaj popolo!

Sumojn sendu rekte al la asocia kancelario!